

L

LABORISTOJ

Internacie: La laborista Eo-movado ekzistis jam antaŭ la unua mondmilito; la unuaj laboristaj EG fondiĝis en 1905-8 en Hago, Hamburgo, Munkeno, Parizo, Stokholmo kaj aliaj lokoj. En diversaj landoj kiel Germanio, Nederlando, Ĉeĥoslovakio kaj Francio aperis laboristaj Eo-gazetoj. Okaze de la UK en Ĝenevo, Kembriĝo, Antverpeno, Krakovo kaj Berno la laboristaj partoprenantoj aranĝis apartan kunvenon, t.n. *Ruĝulan Kongreseton*. Laŭ decido de la Ruĝula Kongreseto en Ĝenevo en 1906 eliris en januaro 1907 la unua n-ro de la monata gazeto *Internacia Socia Revuo*, kiu havis legantojn ankaŭ en Ruslando. La unua tutmonda laborista Eo-organizo estis la *Internacia Asocio Paco-Libereco*, poste nomata *Liberiga Stelo*. Ĝiaj celoj estis 'batali' kontraŭ militismo, kapitalismo, subpremo, lukti por informiĝo, interkompreniĝo, plikleriĝo ktp., disvastigi Eon ĉe internaciistoj, liberecanoj, socialistoj ktp. Sed ekster Francio ne povis esti trovitaj multe da adeptoj. En 1911 UEA klopodis starigi laboristan fakon, sed ne sukcesis. Post la unua mondmilito grupo de francaj laboristaj e-istoj, inter ili Eŭgeno Lanti (1879-1947), faris en 1919 la unuajn paŝojn por restarigi la internaciajn kontaktojn. Krom tio estis revivigita la asocio Liberiga Stelo, kiu adaptis sian statuton al la novaj cirkonstancoj. Liberiga Stelo gajnis membrojn en multaj landoj, kaj la kreskanta influo de *Esperantista Laboristo*, kiu depost oktobro 1920 estis ĝia oficiala organo, povis plifortigi ĝian pozicion. En aŭgusto 1921 okazis en Prago ĝia unua kongreso kun preskaŭ 80 partoprenantoj de 75 nacioj. Laŭ decido de ĉi tiu kongreso Liberiga Stelo alinomiĝis al *Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)* kaj ĝia organo fariĝis *Sen-*

nacieca Revuo. En 1922 aperis unuafoje la *Jarlibro* de SAT, kiu enhavis la adresojn de la delegitoj. La sekvantan jaron SAT havis jam pli ol 2000 membrojn. Tiutempe estis malpermesite al SAT-anoj esti membro de la t.n. neŭtralaj Eo-organizo, ekde 1925 la tiurilata statutartikolo iĝis malpli severa. En oktobro 1924 ekaperis semajna gazeto *Sennaciulo* (kiu en 1928 ŝanĝis sian nomon al *La Nova Epoko*). Fakte ne ĉiuj SAT-anoj konsentis pri la taskoj de SAT, pri ĝiaj starpunktoj, organizaj formoj, taktikoj ktp. Ekzistis anarkiista, komunista, sennaciista kaj socialista frakcioj. La aliĝo de SAT al la Komunista Internacio fiaskis. La landoj kun plej grandaj membronombroj de SAT-anoj estis Germanio kaj Sovetunio, Francio kaj Nederlando, Aŭstrio kaj Svedio. Kiel organizo kun preskaŭ 7000 membroj, eldonante 3 gazetojn, aperigante ampleksan kolekton de diversspecaj verkoj, kaj organizante ĉiujare sukcesan internacian kongreson, SAT, kiu ankaŭ alte taksas la kulturan klerigon de siaj membroj, fariĝis rimarkinda faktoro en la Eo-movado. SAT-anoj apartenas al plej diversaj partioj kaj sociaj kaj ekologiaj movadoj, kelkaj el ili organizas sin ene de SAT en t.n. frakcioj (vd. la retpaĝon de SAT). SAT komprenas sin sennacieca, sed ne sennaciista, kvankam kelkaj SAT-anoj subtenas sennaciismon, kio ne estas la celo de SAT mem. SAT kunlaboras kun aliaj Eo-asocioj. Nur e-istoj povas membriĝi en ĝi. Siatempe la Internacia Transportlaborista Federacio (ITF) aperigis monatan gazetaran informon en Eo. La Internacia Laborista Olimpiado uzis ankaŭ Eon por siaj eldonaĵoj. La Internacio de militrezistantoj aperigis en Eo revuetojn kaj kelkajn broŝurojn. La Internacio de Socialista Kunbatalo (ISK) publikigis trimonatan revuon en Eo. Ankaŭ la Internacia Laborista Asocio kaj la Internacia Antimilitista Oficejo eldonis sciigojn en Eo. En 1930, pro alproksimiĝo al la komunista tendenco, parto de ĝiaj membroj forlasis la asocion kaj starigis la Socialistan Eo-Asocion (SEA), dum alia parto restis sen nacia kunligo. Aperis aliaj skismaj asocioj (TLES en 1924, IPE en 1932, ISE en 1933). Dum SAT en la periodo de la malvarma milito estis malpermesita aŭ nedezirata en la landoj de la komunisma bloko, kun la escepto de Jugoslavio, kie ĝi okazigis

plurajn kongresojn, aperis en tiuj landoj Eo-asocioj, kiuj deklaris sin laboristaj kaj agadis ĉu kadre de la 'neŭtrala movado', kaj precipe kadre de MEM (Mondpaca E-ista Unuiĝo). Internacia Esperantista Komunista Kolektivo (IKEK) estis starigita fare de aŭstraj komunistaj e-istoj en 1974. Post la disfalo de la komunisma bloko en Orienta Eŭropo MEM rapide malaperis, same kiel multaj orienteŭropaj Eo-asocioj malfortiĝis, ĉar ili ne plu ricevis ŝtatan subtenon. SAT (kaj IKEK) pluekzistas, kaj Monda Asembleo Socia (MAS) naskiĝis en la jaro 2005. Aktivaj membroj de IKEK estas la svislandanoj *Carlo Nicolodi* kaj *Dieter Rooke* (ĝenerala sekretario kaj peranto de *Internaciisto*).

Carlo Nicolodi-Nielsen (*1940), loĝanta en Allschwil/BL, trapasis siajn lernejnarojn en soveta Latvio (ĝis 1952), en Italio (ĝis 1960) kaj en Germanio (ĝis 1964), lernis Eon en la dua duono de la 1960aj jaroj, ĉar ambaŭ gepatroj estis e-istoj. La german-devena flegisto Dieter Rooke (*1948) loĝas en Oensingen/SO.



Carlo Nicolodi, Dieter Rooke kaj David Buhlmann

Svislando: En 1907 fondiĝis laborista EG en Baden/AG, kies gvidantoj, kiuj estis dungitoj de la komerca konzerno BBC, okazigis Eo-kurson por teknikistoj kaj komercistoj de sia entrepreno. →Karl Jost el Zuriko helpis la junan societeton per kursgvidado. En 1909 estis starigita *Geneva Esperantista Laborista Grupo*, kies anoj kunvenis ĉiuvendrede en la Popoldomo (Maison du Peuple). *Madeleine Vuille* (poste →Stakian) gvidis Eo-kurson en la ĝeneva laborista EK. La Eo-agado en Vaŭdo, havante sian kernon en komercistaj-industriistaj, poste ankaŭ laboristaj-fervojistaj medioj, komenciĝis kun kursoj kaj prelegoj en la komerca lernejo ĉe placo Chauderon, kie formiĝis la Eo-ĉelo de Laŭzano. Precipe

la Popoldomo de Laŭzano longe ludis la rolon de kunveno de la laŭzanaj e-istoj, fakte ĝis 1995. Al la *laborista ES Lausanne* apartenis *André Buttet* (+1972), frua svisa Eo-pioniro, kiu ĝis antaŭ la dua mondmilito gvidis kursojn kaj regule partoprenis Eorenkontiĝojn; *César Amaudruz* (1894-1975), lignaĵisto, ĝardenisto, domservisto, terkulturisto kaj bovin-bredisto en Le Mont s/Lausanne; *Paul Arbenz* (1908-77), dungito de la telefona administrado en Laŭzano. En la laborista ES Arbenz rolis kiel sekretario (1930-32), prezidanto (1933-36 kaj 1950-ĉ. 1976), kasisto (1938-44) kaj vicprezidanto (70aj jaroj). Al la laborista movado apartenis ankaŭ la tre aktiva fervojisto *William Perrochon* (1899-1947), kiun oni povis renkonti tie ankoraŭ en la 1970aj jaroj. Lia fervojista kolego *Fritz Hugi* (1901-75) iniciatis laboristan fondaĵon por la t.n. sociala loĝejonkonstruado. Pri la laŭzana laborista EG Zamenhof ekzistas protokoloj inter 1929 kaj 1971 (deponitaj en CDELI).



Peter Arbenz, Madeleine Stakian-Vuille, Erna Döring

Laŭ la revuo *Vespera Horo* en Ebnat-Kappel/SG en 1910 ariĝis L. por studi Eon. Laŭ sciigo de *La Semanto* (nov. 1935) ekzistis ankaŭ laborista ES en Bazelo, kies fundamento estis fiksita en 1925 kaj kiu funkciis ĝis 1939, do ĝis la komenco de la mondmilito. La jarlibro de SAT de 1927/28 indikas 6 adresojn en la urbo Bazelo, aliajn en Allschwil (ges-roj Schmutz), Birsfelden (Nerina Gessaga), Liestal (Josef Kullnig) kaj Riehen (Walter Suhr). En 1928 Gessaga vojaĝis al Moskvo pere de Eo por partopreni sportan aranĝon kaj renkonti sian sovietian Eo-korespondanton.

En 1943 la laboristaj e-istoj malakceptis kunfandiĝon kun SES, laŭ konsilo de →Hans Kürsteiner.

Krome diversloke ekzistis grupoj de laboristaj e-istoj kaj estis fonditaj ankaŭ EG kadre de komercaj societoj. Sed pro la relativa malforteco de diversaj EG, laboristaj kaj aliaj, en la urboj (ekz. Ĝenevo kaj Laŭzano) la laboristaj e-istoj unuiĝis en Svislando ĝenerale kun la ceteraj e-istoj por havi nur unu ES en ĉiu svisa urbo. La komercistaj Eorondoj malaperis.



La svisajn laboristajn e-istojn ligis la bulteno *La Semanto* (de kiu CDELI posedas la plej fruajn eldonojn el la jaro 1935). Ĝin redaktis laŭvice Madeleine Vuille (→Stakian), Paul Arbenz, →Jeanne Schmutz kaj →David Buhlmann (1967). *La Semanto* regule raportis pri la eventoj de la svisa kaj internacia laboristaj movadoj kaj ankaŭ respegulis la etoson kaj la konvinkojn tiam dominantajn. Ekzemple en la eldono de novembro 1935 estis skribite: „Vivu la rusa oktobra revolucio de 1917! Ni sekvu la vojon de Lenin“ ktp. Sed klare ne mankis ankaŭ kritikaj komentoj rilate la progreson de Eo: „Ni ĉiuj, svisaj laboristoj E-istaj jam de kelkaj jaroj rimarkas, ke nia lingvo ne sukcesas kapti novajn adeptojn en la laborista klaso“ (dec. 1935).

Prezentante ĉefajn datojn el la historio de la laborista movado, la *Jarlibro* de SAT indikis en 1923 11 svisajn membrojn, de kiuj la duono loĝis en Laŭzano. En 1927 la sama jarlibro publikigis la nomojn kaj adresojn de 23 svisoj, ĉifoje la duono el ili devenis el la bazela regiono. En 1928 la svisa membro-nombro kreskis al 31, en 1929/30 al 46, de kiuj 11 en Ĝenevo (i.a. gefratoj Vuille kaj →Juliette Vatr -Baudin). Kompare kun tiu periodo, en la postmilitaj jardekoj la nombro de svisaj SAT-anoj draste reduktiĝis. En la 60aj jaroj oficis kiel delegitoj ĉefe Giovanni

Sasselli en Tiĉino, Manfred F hrer, en la 70aj jaroj Henriette Ith, →Marcel Erbeta, →Daniel R. M hlemann kaj Gerard Cool; Richard kaj Martine Schneller estis inter la organizantoj de la *SAT-Amikara kongreso* en Laŭzano en 1973. Depost la 80aj jaroj troviĝas inter svisaj SAT-anoj →Hermann Schmutz, Ueli Haenni, Edy Zarro, Eduard Muster, →Henri Vatr , John Thum, Alice Kessler, Ruth Sch rli, Nerina Gessaga, →Friedrich Bierhoff, →Jean Waldvogel, →Otto Walder, →David Buhlmann, Jimmy Rivier  kaj →Claude Gacond, kiel kolektivo ankaŭ SAEF kaj la laŭzana EG. →Erna D ring rolis kiel SAT-perantino. La romandaj e-istoj estas reprezentitaj en SAT-Amikaro, la SAT-movado por Franclingvio. →Mireille Grosjean-Robert aktivas kiel pedagogia konsilantino de SAT-Amikaro kaj ĝenerale respondecas pri SAT-Amikaro en Svislando. La bulteno de SAT-Amikaro nomiĝas *La Sago*.

En 1981 la jugoslavia e-isto *Gvozden Sredi * fondis en Bazelo la Eo-sekcion de la klubo de jugoslaviaj gast-laboristoj.

En Svislando okazis tri grandaj SAT-manifestacioj: En 1973 okazis en Laŭzano la 28a kongreso de la SAT-Amikaro, en 1981 okazis en Bazelo la 54a SAT-kongreso, kaj en julio 2003 La Chaux-de-Fonds gastigis la 76an SAT-kongreson.



Kongreso de la SAT-Amikaro en Lausanne en 1973

Ankaŭ la Ido-movado konis laboristajn grupojn: En Basel, kie en novembro 1912 okazis internacia kongreso de socialistoj, aperis *laborista Ido-grupo*, kiu estis prezidata de A. Leepin. En St. Gallen ekzistis *laborista Ido-grupo*. (→Ido en Svislando)

Werner LAEDERACH-EMMES

1912-2002



Post la trapaso de ĉiuj lernejoj en Berno kaj la instruigo pri asekur-matematiko L. akiris la superan ekzamenon pri asekur-fakoj (1942) kaj 1931-77 laboris kiel asekura matematikisto en la asekurejo Rentenanstalt en Zuriko.

L. aliĝis al la Eo-movado en 1931 post lingvokurso de Andreo Cseh en la zurika ES, en kiu li membriĝis en 1942. Ĝin li aktive servis unue kiel ĝia sekretario (1947), poste prezidanto (1948) kaj vicprezidanto (1981-92), tiel ke en 1962 li estis elektita kiel ĝia honora membro. De 1943 L., kiu partoprenis en pluraj UK, estis membro de UEA, iam li estis ankaŭ fakdelegito pri asekuro kaj vicdelegito por Zuriko. En 1947 li aliĝis al Universala Ligo (fondita de →Edmond Privat) kaj en 1979 al Veterana E-ista Klubo. En la 1950aj jaroj L., kiu posedis diplomon por la instruado de Eo (1957), aktivis kadre de la t.n. koordinataj Eo-kursoj (KEK), en 1951-61 deĵorante kiel sekretario kaj Eo-instruisto en la zurika popola altlernejo (kun honorario de la kanton). Dufoje L. estis prezidanto de SES, nome en 1950-53 kaj 1966-71. Krome li agadis kiel ano de la ekzamena komitato (1964-80), kiun li prezidis en 1965-66. 1957-80 li reprezentis SESn kiel delegito en la nacia svisa komitato de Unesko. En sia funkcio kiel SES-prezidanto L. apartenis al la kunfondantoj de CDELI (1967) kaj de KCE (1968), kie li kunlaboris plurajn jarojn kiel ano de la Komisiono Eo lernejen. En 1974 SES elektis lin honora membro. En 1976-78 L. rolis kiel prezidanto de LKK de la 64a UK (Lucerno 1979). En 1987-88 li ree instruis Eon, ĉifoje en la t.n. zurika vojaĝ-altlernejo.

Ankaŭ liaj edzino *Martha Emmes* kaj filino Susanne Plonner-L. iom partoprenis la Eo-vivon.

→Zuriko →SES →KCE

→Instruado de Eo en Svislando

Fritz LIECHTI

1913-2001

Hanny LIECHTI-KILCHHOFER

1914-1999



Post la trafiklernejo en Berno kaj dujara instruigo pri radiotelegrafio en aertrafiko, Fritz L. fariĝis oficisto de radiotelegrafado, flugkontrolado kaj aertrafika informado por pilotoj, ĉefe en la zurika flughaveno, 1964-78 li estris ĝian inform-oficejon; krome li kunfondis la internacian informservon por pilotoj.

Fritz L. e-istiĝis en 1944 en kurso de Willy Nüesch en Rheineck/SG, kies lokan EG li kunfondis, kaj ĝis 1950 estis ĝia aktiva membro. L. posedis la ateston pri lernado kaj la superan diplomon de Eo. En 1950 L. aliĝis al la zurika ES, kies prezidanto li estis inter 1964 kaj 1992 (1974 honora membro, 1992 honora prezidanto). 1947-50 F. estis prezidanto de SES (1974 honora membro), 1986-94 li denove apartenis al la CK de SES kiel ĝia vicprezidanto, kaj en 1991-96 li transprenis ankaŭ la redaktadon de la bulteno *SES informas*, post kiam ekpaneis la antaŭa organo *SER*. Membro de UEA, en 1951-77 L. rolis ankaŭ kiel prezidanto de la svisa KELI-sekcio, fondis kaj redaktis la informilon *Kristana Bulteno* (ĝis 1977).

Fidele helpata de sia Eon parolanta edzino *Hanny Kilchhofer* (1914-1999), inter 1953-77 L. organizis plurajn KELI-kongresojn en Svislando, inter 1971-77 li kunlaboris ankaŭ

kun la organizantoj de la Eŭropaj Feriosemajnoj de SAEF en Fürigen, Magliaso kaj Wengen, gvidante la superajn lecionojn (en sia funkcio kiel tiama prezidanto de la ekzamena komitato de SES).



Fritz Liechti en Häbernbach en 1949



Fritz kaj Hanny Liechti kun Kurt Greutert

Ankaŭ en la svisa sekcio de la Eŭropa Federalista Partio (1978). L. instruis Eon; en 1983 sekvis la eldono de lia perkaseda Eo-kurso. La kulminojn de sia Eo-aktiveco L. travivis, kiam en 1976 estis flugigita, esence pro lia iniciato, la unua Eo-balono en la mondo, kaj en 1979, jaro de la fondo de la filatela servo okaze de la 64a UK en Svislando, kiam aperis, dank' al la klopodoj de ĉi tiu fervora zurika e-isto, la unua Eo-poŝtmarko de Svislando (valoro de 70 centimoj), kiu portis la motivon de la Eo-balono.

→ Zuriko → Svisa Esperanto-Societo
 → Esperanto-Balono → Kristanoj → Fervojistoj
 → Instruado de Eo en Svislando

LIGO DE NACIOJ

En la pasinteco diversaj internaciaj organizaĵoj registaraj kaj neregistaraj okupiĝis pri la demando de neŭtrala universala lingvo en internaciaj rilatoj, kaj aparte pri la adopto kaj eventuala enkonduko de Eo: temas precipe pri → Ruĝa Kruco, Ligo de Nacioj (1920-46), kiu havis sian sidejon en Ĝenevo, kaj Unuiĝintaj Nacioj, en kiuj fontas la famaj Eo-rezolucioj de Unesko de la jaroj 1954 kaj 1985.

Post la unua mondmilito Eo estis disvastiĝinta en multaj landoj de la mondo, kaj ĝiaj literatura kaj kultura faktoroj ne estis ignoreblaj, la praktika parola uzo dum kongresoj kaj ĉiaspecaj aliaj internaciaj renkontiĝoj ĉiam pli vasta. Tiel la temo fariĝis aktuala ankaŭ en L.

La monografio *EoeP* (1974) dediĉis apartan ĉapitron al la ĉi-koncernaj okazintaĵoj en L., kiu ekde sia fondo konstante ricevis peticiojn favore al la adopto de neŭtrala universala lingvo kaj de Eo aparte. La Ĝenerala Sekretariejo esploris tiujn peticiojn kun granda intereso, kiel ĝi mem skribis en sia raporto de 1922. Sekvas resumo de tiu memorinda historio.

En tiaj kondiĉoj ekaktivis → *Edmond Privat* (1889-1962), kiu en la unuaj jaroj de L. rolis kiel honora konsilanto de la persa ĉefdelegito, princo Arfa-ed-Doŭleh Mirza Riza Ĥan (1848-1936), kaj poste ankaŭ kiel vicdelegito de Persujo ĉe L. Kiel Privat notis en *Aventuroj de Pioniro* (ĉapitro pri L.), li pretis labori senpage por Persujo kondiĉe ke li fariĝu laŭrajta membro de la delegitaro kaj ricevu permeson defendi Eon, se la temo estos tuŝita de la organizo. La registaro de Persujo konsentis, kaj princo Arfa mem subtenis la aferon de Eo, subskribante la unuan proponon kune kun Lord Cecil kaj kelkaj delegitoj de aliaj landoj.

Laŭ la iniciato de Privat, la 9an de decembro 1920, 11 delegitoj prezentis al la Asembleo de L. projekton de rezolucio kun jena teksto: „La L., konsciante pri la lingvaj malfacilaĵoj, kiuj obstaklas rektan komunikadon inter la popoloj, kaj pri la urĝa bezono trovi ian praktikan rimedon por forigi tiun ĉi obstaklon kaj helpi al bona interkompreniĝo inter la nacioj, sekvas kun intereso la eksperimentojn rilate la oficialan instruadon de la Internacia Lingvo

vo Eo en la publikaj lernejoj de kelkaj el la membroj de la L.; esperas, ke tiu instruado fariĝos pli ĝenerala en la tuta mondo, tiel ke la infanoj de ĉiuj landoj povu scii almenaŭ du lingvojn: sian gepatran kaj unu facilan rimedon por la internacia komunikado; (kaj) petas la Ĝeneralan Sekretarion prepari por la sekva Asembleo raporteton pri la rezultoj atingitaj en tiu ĉi rilato.“ (*League of Nations, Assembly Document 253, 17.12.1920; 20/48/194*).



Ĝis 1936 Ligo de Nacioj troviĝis en Palais Wilson en Ĝenevo, konstruita en 1873-75 kiel Hôtel National. En tiu jaro Ligo de Nacioj translokiĝis al la Palaco de Nacioj. (Historia foto)



Palais Wilson nuntempe

La rezoluci-projekto, kiun apogis Belgio, Brazilo, Ĉilio, Ĉinio, Haitio, Hindio, Italio, Kolumbio, Persio, Sudafriko kaj Ĉeĥoslovakio, provokis fortan kontraŭstaron precipe de Francio, kiu, sentante la minacon de la angla lingva konkurenco, timis signifoperdon de la franca lingvo. Tiuj cirkonstancoj eĉ kondukis al malpermeso de Eo-kursoj en francaj lernejoj kaj de la Eo-propagando laŭ ordono de la tiama franca ministro pri publika instruado,


edukministro Léon Bérard (en tiu cirkulero de la 3a junio 1922 Bérard skribis al ĉiuj universitataj rektoroj de Francio, ke artefarita lingvo kiel Eo estas danĝera vektoro de la internaciismo kaj konkurenco de la franca lingvo en la mondo).

La rezolucia Propono estis ekzamenita unue de la Dua Komitato de L. En sia Raporto al la Asembleo (*dok. 253: 20/48/253*) la Dua Komitato „konsentis kun la subskribintoj rilate la seriozecon de la lingvaj malfacilaĵoj, kiuj obstaklas rektajn rilatojn inter la popoloj, kiel ankaŭ rilate la deziron, ke internacia lingvo devus esti instruata en ĉiuj lernejoj (...). La Komitato tamen opiniis, ke estus dezirinde komenci per enketo surbaze de la ekzistantaj faktoj...”. Krom tio la Raporto agnoskis la sukcesan utiligon de Eo en pluraj universalaj kongresoj kaj la egalecon inter la parolantoj, kiun ebligas tia neŭtrala universala lingvo. La Komitato tamen opiniis ankaŭ, ke la Asembleo ne devus akcepti respondecojn ekster sia kompetenteco. Tial ĝi forigis la alvokon por ĝenerala instruado de la internacia lingvo. Laŭ tio la fina Propono de la Dua Komitato al la Asembleo tekstis jene: „La L., konsciante pri la lingvaj malfacilaĵoj, kiuj obstaklas rektan komunikadon inter la popoloj, kaj pri la larĝa bezono trovi ian praktikan rimedon por forigi tiun ĉi obstaklon kaj helpi al bona interkompreniĝo inter la nacioj, sekvas kun intereso la eksperimentojn rilate la oficialan instruadon de la Internacia Lingvo Eo en la publikaj lernejoj de kelkaj el la membroj de L.; (kaj) rekomendas al la Ĝenerala Sekretario prepari por la sekva Asembleo Raporton pri la rezultoj atingitaj en tiu ĉi rilato.” Bedaŭrinde la afero finiĝis malbone. Kiam la belga raportisto prezentis la rekomendon al la lasta Plena Sesio de la Asembleo, la prezidanto (ankaŭ belgo) interrompis lin per mokado, kaj la franca delegito Hanotaux, tiutempe bone konata diplomato, proponis ke oni entute ne diskutu la temon, ĉar „jam ekzistas internacia lingvo: la franca”. Post voĉdonigo de la Propono, ke la diskuto estu prokrastita, kaj post iom da konfuzo li deklaris, ke la demando estas forŝovita. Sekve la Raporto de la Dua Komitato ne estis akceptita de la Unua Asembleo en 1920.

La 9an de septembro 1921, okaze de la Dua Asembleo de L., la Propono de 1920 estis renovigita en identa formo. Ĉi-foje ĝi estis prezentita de la delegitoj de Sudafriko, Rumanio, Persio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Kolombio, Ĉinio, Finnlando, Albanio, Japanio, Venezuelo, Hindio kaj Pollando – la ĉi-lastaj kun rezervoj. La subskribintoj samtempe petis la prezidanton de la Asembleo, ke la menciita Raporto (*dok. 253*) de la Dua Komitato kaj la Raporto (triparta) de d-ro *Inazo Nitobe* (1862-1933), la tiama ĝenerala subsekretario de L. el Japanio, pri lia vizito de la 13a UK en Prago (1921), estu komunikitaj al ĉiuj delegacioj. La du dokumentoj estis efektive distribuitaj al la delegitoj, kaj la Propono eniris la tagordon de la Dua Asembleo. La objektiva kaj tute favora Raporto de Nitobe entenis i.a. la pledon favore al la neŭtrala universala lingvo sur la kampoj de komerco kaj scienco kaj emfazis la utilon de tia lingvo por la laboristaro.

La Dua Asembleo akceptis la konkludojn de la Dua Komitato de la 17a de decembro 1920, ordonis al la Sekretariejo entrepreni la proponitan enketon kaj decidis konsideri la demandon pri la instruado de Eo en la lernejoj en la tagordo de la Tria Asembleo. La koncerna rezolucio estis akceptita la 15an de septembro 1921. Tuj la Ĝenerala Sekretariejo dissendis demandaron al ĉiuj membroŝtatoj de L. kaj al diversaj kompetentaj organizaĵoj. Ankaŭ estis disponigitaj necesaj salonoj en la Palaco de la L. en Genevo por okazigi internacian konferencon pri la instruado de Eo en lernejoj en aprilo 1922, en kiu partoprenis reprezentantoj de komunumaj kaj lernejaj aŭtoritatoj kaj de edukaj instancoj el 28 landoj. 16 ŝtatoj sendis siajn oficialajn registrajn observantojn. Ĉi tiu konferenco estis kunvokita de la Instituto Jean-Jacques Rousseau en Genevo, kies direktoro estis → *Pierre Bovet* (1878-1965). Post pritrakto de la tuta demando en spirito sciececa kaj senpartia, la Instituto liveris al la Sekretariejo de L. grandparton de la informoj necesaj rilate la instruadon de Eo en la lernejoj (→ Instruado de Eo en Svislando, → Antologio). La dokumentaro entenis ankaŭ rekomendon pri la ĝenerala Eo-instruado en la publikaj lernejoj de la tuta mondo kiel rimedo por la internacia rilatado. Per tio la prestiĝo de la grandaj naciaj lingvoj

kompreneble ne estis tuŝita. Krom tio la Sekretariejo ricevis amason da dokumentoj kaj proponoj koncerne la lingvan problemon ĝenerale. Ne mankis ankaŭ protagonistoj de aliaj planlingvaj projektoj (Ido, Esperantido, Parlamento, Romanal, Occidental, Medial k.a.). Aliflanke influaj skandinaviaj asocioj proponis la adopton de la angla lingvo kiel monda helplingvo, kaj el Usono (!) eĉ venis la sugesto revivigi la latinan lingvon.




Raporto de la Internacia Konferenco pri la instruado de Esperanto en la lernejoj (1922)

Surbaze de la kolektitaj informoj la Sekretariejo verkis ampleksan Raporton sub la titolo *Eo kiel Internacia Helpa Lingvo* (originala titolo en la angla lingvo; → Antologio). Ĉi tiu en si mem tre pozitiva Raporto kun dato de la 28a de junio 1922 resumis la ĝisnunajn praktikajn spertojn, emfazante la atingojn kaj meritojn de Eo, ekzemple ke Eo estas vaste uzata en internaciaj kongresoj kaj ĉiaspecaj

renkontiĝoj, en turismo, komerco kaj kulturo, kaj estis submetita al la Tria Asembleo. Pri la facileco de Eo la Raporto konkludis jene: „Oni povas aserti kun absoluta certeco, ke Eo estas ok ĝis dek fojojn pli facila ol iu ajn fremda lingvo, kaj ke estas eble ellerni perfektan parolkapablon sen forlasi sian propran landon.”

Dum la Tria Asembleo, en aŭtuno 1922, la Raporto estis traktita de la Kvina Komitato. Dum la konkludoj de la Raporto estis vigle subtenata de profesoro Gilbert Murray, fama helenisto el Oksfordo, kiu reprezentis Sudafrikon, la ĉefaj oponentoj venis ĉifoje el Danlando kaj Brazilo, kies ambasadoro (Rio Branco) denunciis Eon kiel „lingvon de mizeruloj kaj komunistoj” kaj ne hezitis distribui private presitan broŝuron kun sia parolado (titolpaĝon vd. apude). La franca raportisto, senatano G. Reynald, deklaris, ke li ricevis la instrukcion malaprobi ajnan „mondlingvon” kun la escepto de la franca lingvo. La franco proponis, ke la tuta afero estu transdonita al la *Komisiono pri Intelekta Kunlaboro*. Post tritaga diskutado, ofte pasia, la Kvina Komitato akceptis kompromisan solvon: unuflanke aprobi kun malgrandaj modifoj la Raporton de la Sekretariejo, kaj aliflanke sendi la lernejan demandon por pritrakto al la *Komisiono pri Intelekta Kunlaboro*. Estis ankaŭ decidite aldoni la kompletan tekston de la Raporto de la Pariza Komerca Ĉambro, kiu estis tre favora al Eo. Dum sia kunveno de la 21a de septembro 1922 la Tria Asembleo de la Kvina Komitato akceptis kaj oficialigis la Raporton de la Sekretariejo de la 28a de junio 1922, kun ŝanĝoj kaj novaj aldoniĝoj. Konforme al la decido de la Tria Asembleo, la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado (angle: Committee on Intellectual Co-Operation) okupiĝis pri la demando dum tri kunsidoj, inter la 31a de julio kaj 1a de aŭgusto 1923. Dum la hispana delegito vigle aprobis la aferon, proponante instali subkomitaton por studi, kun la helpo de spertuloj, eblajn solvojn de la lingva demando, tre forta kontraŭstaro, fakte en kalumnia formo, estis lanĉita de →Gonzague de Reynold (1880-1970), la ĉefraportisto kaj oficiala reprezentanto de la svisa registaro. Ĉi tiu influa romano kaj renoma universitata profesoro estis konata kiel konservema, en la politiko

dekstre orientita intelektulo. Gonzague de Reynold fakte montriĝis decida malamiko de Eo, kiun li abomenis kiel „barbaran lingvon“; li entute ne ŝatis la ideon de neŭtrala universala lingvo, preferante la revigligon de klasika lingvo kiel la latina.



Argumentaro kontraŭ Esperanto prezentita de Brazilo en Ligo de Nacioj en 1922

Asertante, ke li studis la problemon de „helpa lingvo” el ĉiuj flankoj, havigante al si kompetentajn opiniojn, Gonzague de Reynold kritikis, ke Eo havas malfacilan skribsistemon, ke ĝia alfabeto estas komplika kaj ke ĝiaj konsonantoj estas akcentitaj laŭ la slava maniero. Iuj membroj de la Komisiono (al kiu cetere apartenis ankaŭ la german-svisa nobelpremiito pri fiziko Albert Einstein, kiu laŭ la libro *Pri Internacia Lingvo dum jarcentoj* de Isaj Dratwer/1977 favore esprimis sin pri Eo) komencis diskuti pri kiom da vortradikoj intelektuloj bezonu por siaj paroladoj, alia membro (Luchoire) esprimis la opinion, ke „ne-intelektuloj” apenaŭ bezonus internacian

komunikilon kaj ke por la orientanoj sufiĉus, se ili lernus unu el la grandaj nacilingvoj de Okcidento, se ili deziras kontakti la okcidentan mondon. Lowes Dickinson, alia membro de la Komisiono, subtenante la vidpunkton de la hispana membro, laŭdis la utilon kaj la avantaĝojn de neŭtrala universala lingvo, atentigante la Komisionon pri la nekontentiga lingva situacio en L., kie estas ĉefe uzataj du 'oficialaj' lingvoj, nome la angla kaj franca. Laŭ la instrukcio de Bérard, la franca delegito en L., la filozofo Henri Bergson (1859-1941), kiu pli frue favoris Eon, kiam lia universitata kolego Louis Couturat laboris por la Delegacio, devis interveni, por ke la Komisiono rifuzu la studadon de la demando de la neŭtrala universala lingvo. (Kiam Couturat batalis kontraŭ Eo favore al Ido, ankaŭ Bergson ŝanĝis sian sintenon al Eo).



Gonzague de Reynold (1922) kaj Edmond Privat, la kontraŭuloj en Ligo de Nacioj rilate Esperanton

Post tiu absurda diskuto, plena de antaŭjuĝoj kaj maldeziroj serioze trakti la temon, la Komisiono pri Intelekta Kunlaboro decidis per ses voĉoj, unu kontraŭ kaj tri sindetenoj, ne studi la demandon pri la instruado de Eo en la lernejoj, nek rekomendi „artefaritan lingvon” al la atento de L. Ankaŭ la interveno de Nitobe antaŭ tiu voĉdono ne plu povis ŝanĝi la konvinkon de la plimulto de la komisionanoj, nek la decidon de la Komisiono en si mem. Ŝajnas ke la Komisiono pri Intelekta Kunlaboro ankoraŭ submetis sian negativan decidon al la *Komisiono pri homa bonfarto kaj ĝeneralaj demandoj*. Tie la decido estis vigle kontestata, tiel ke Gonzague de Reynold estis devigata retiri ĝin.

Kiam la konkludoj de la Komisiono estis laŭtlegitaj dum la 15a UK en Nurembergo (1923), la komunikado provokis rideksplodon de preskaŭ 5000 kongresanoj.

Dum la Kvara Asembleo de L. (1923) profesoro Jacques Bardoux el Francio utiligis la negativan respondon de la Komisiono pri Intelekta Kunlaboro por prezenti sian proponon al la Kvina Komitato en formo de rezolucio rekomendanta la studadon de fremdaj nacilingvoj anstataŭ la lernado de „artefarita helplingvo”. Sed en ĉi tiu kazo kelkaj alinaciaj delegacioj malkonsentis. Pluraj klarigis, ke ili ne volus insisti pri Eo por ne malplaĉi al la franca registaro, sed ke aliflanke ili ankaŭ ne dezirus akcepti ion ajn, kio povus ŝajni en iu ajn senco kontraŭ Eo. Sekve Bardoux retiris sian proponon. Fakte la Rezolucio de la Komisiono pri Intelekta Kunlaboro estis neniam akceptita aŭ aprobita en iu ajn formo fare de L. Restis do nur la oficialigita Raporto de la Sekretariejo de la 28a de junio 1922, kiel prezentite supre.

En 1924 la nova ĉefministro de Francio, Herriot, nuligis la instrukcion de Bérard, per kiu estis malpermesita la instruado de Eo en la francaj lernejoj. Herriot eĉ subtenis proponon de diversaj delegacioj (persa, ĉina, japana, nederlanda kaj aŭstralia), ke Eo estu rekonita kiel „klara lingvo“ en *telegrafio*. Ĉi tiu propono estis submetita al la Dua Komitato de la Kvina Asembleo en 1924, kiu akceptis ĝin per 13 voĉoj kontraŭ 9. La 20an de septembro 1924 la decido de la Dua Komitato estis unanime konfirmita de la Plenkunsido de la Asembleo.



Kunsido de la Komisiono pri Intelekta Kunlaboro de Ligo de Nacioj, en Parizo 1926. Maldekstre eblas rekoni Gonzague de Reynold.

Do la diskuto pri neŭtrala universala lingvo praktike konkludiĝis dum la 16a Plenkunsido de la Ligo, en septembro 1924, kies rezolucio

rekomendis al la membroŝtatoj allasi Eon kiel lingvon en la telegrafio kaj radiotelegrafio. Jam la sekvan jaron, dum la konferenco de Universala Telegrafa Unio (ekde 1932 ĝi nomiĝis Unio Internacia de Telekomunikado), okazinta en Parizo en septembro 1925, estis pritraktita ankaŭ la rekomendo de L. La konferenco akceptis la rekomendon, amende koncernan paragrafon de sia statuto por aldoni la internacian lingvon al la lingvoj, kies uzado estas permesata. Tiu decido restis senŝanĝa kaj pluvalidis. Cetere la eksdirektoro de la Buroo de la Internacia Telegrafa Unio (BITU) en Berno, →Emil Frey (1838-1922), ĝia ĉefo ĝis 1921, estis varma subtenanto de la lingvo Eo. Nelaste la internacia kongreso de la Universala Federiĝo de la pedagogiaj asocioj, kunveninta en Ĝenevo en 1929, envicigis Eon inter la laborlingvoj, pro la graveco de la Eo-delegacio.



Esperanto-raporto de la Ĝenerala Sekretariejo de Ligo de Nacioj en 1922

Kiel aludite ankaŭ aliaj planlingvoj kiel Ido kaj Occidental estis diskutitaj kiel ebla alternativo. →Marcel Pesch, kiu laboris kiel ste-

nografo-tradukisto ĉe L., evidente sukcesis atingi, ke la Internacia Laboroficejo en Ĝenevo permesis uzi Idon kiel korespondlingvon.

Kritiko: La epizodo pri la diskuto rilate la neŭtralan universalan lingvon en la 1920aj jaroj sine de L. estas elstara ekzemplo de komplika kaj absurda burokratia proceduro, kiu brile kapablis faligi studindan projekton kaj permesi la damaĝan influon flanke de Gonzague de Reynold. Ŝajnas, ke L. supozeble maltrafis unikan ŝancon por fari kuraĝan decidon principan sur la kampo de la adopto de neŭtrala universala lingvo respektive de Eo, kaj direktitaj estis la reloj kontraŭ-planlingvaj, sed nacilingvaj por la estonto. Ankaŭ la bojkota sinteno de Francio vidalvide de tiu demando estas memorinda; ĝi verŝajne ankoraŭ longe rezonadis malhelpo al la objektiva pritakso de la demando de neŭtrala universala lingvo. La koncernaj rezoluciaj atingoj en Unesko (Montevideo 1954 kaj Sofio 1985) pruvante, ke la ŝtataro agnoskas Eon kiel lingvon, kiu atingis gravajn rezultojn „sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj pro la proksimigo de la popoloj de la mondo”, atribuas al ĝi ekzistorajton en scienco, edukado kaj kulturo kaj rekomendas ĝin kiel instruobjekton en la „lernejoj aŭ superaj edukaj instancoj” de siaj membroŝtatoj. En dua rezolucio, kiu estis alprenita en 1985 vide al la centjariĝo de Eo (1987), Unesko konfirmis siajn konstatojn faritajn en la montevidea rezolucio de 1954. Per tiu bonvola sinteno Unesko, integra organizaĵo sine de Unuiĝintaj Nacioj, korektis la fuŝlaboron de L. rilate la neŭtralan universalan lingvon kaj precipe de la Komisiono pri Intelekta Kunlaboro, gvidata de Gonzague de Reynold, kiu por la objektiva pritakso de Eo estis komplete maltaŭga persono.

→Gonzague de Reynold →Edmond Privat
→Antologio

LIĤTENŜTEJNO

EdEo (1933) mencias, ke en L. dufoje aperis oficialaj poŝtkartoj kun Eo-surskribo kaj trifoje esperantlingvaj prospektoj kaj ke iuj e-istoj faris turisman reklamon por la princlando ankaŭ en nacilingvaj gazetoj. La efektiviganto de tiu propaganda maniero estis Robert


Kreuz, direktoro de UEA en Ĝenevo. *SE* 3/35 raportis, ke Francisko, princo de L., nomis Kreuz-on „Princa Komerca Konsilisto“, konsiderante liajn meritojn pri la turismo en ĉi tiu princlando. Kreuz faris ne nur propagandon por la alpa ŝtateto situanta inter Svislando kaj Aŭstrio per Eo, sed ankaŭ reprezentis la tiean registaron kiel speciala komisiito en la UKj kaj aliaj kongresoj. Aperis lihtenŝtejna Eo-poŝtkarto (vd. sube).



LITERATURA FOIRO (revuo)

Kultura revuo en Eo, fondita de la literatura rondo La Patrolo en Milano en 1970. De tiam ĝi aperas regule ĉiun duan monaton (en 1987 eĉ pli ofte) kaj atingis la 200an numeron en decembro 2002. La ĉefredaktoroj de L. estis: →*Giorgio Silfer* (1970-80), →*Perla Martinelli* (1980-95), en 1996 la ĉefredaktadon transprenis Ljubomir Trifonĉovski en Bulgario. Ekde 1980 la revuo estas posedata de la eldonejo *Kooperativo de →Literatura Foiro (LF-koop)*. Kiam en 1975 ĉesis aperi *Norda Prismo*, ĝian rolon transprenis *LF*, kiu samtempe fermis sian italan periodon, migrante kun Silfer al Finnlando, kie 1976-78 situis la redaktejo antaŭ ol instaligi en Svislando en la nove inaŭgurita domo de KCE. L. apartenas al la plej kontinuaj kaj intelekte influaj kulturaj revuoj en Eo. Kiel organo de Esperanta PEN-Centro (ekde 1991) L. traktas precipe beletron, sed ankaŭ muzikon, teatron, kinon, sociologion, lingvistikon, kulturpolitikon, planlingvistikon kaj Eo-movadologion, arigante ĉirkaŭ si interesajn verkistojn kaj publicistojn, ne nur e-istajn. 1991-2001 L. aperadis kun la aŭspicio de SES. Kiel ĉefparolilo de la raŭmisma opinimovado L. kontribuis ankaŭ al la starigo de la →*Esperanta Civito*.

→*Literatura Foiro*, kooperativo →*SES*



Titolpaĝo de la revuo *Literatura Foiro* en 1991 okaze de la 700-jariĝo de Svislando

LITERATURA FOIRO (kooperativo, LF-koop)

Kooperativa societo kun jure registrita sidejo en Svislando, starigita la 30an de majo 1980 el la cindroj de *La Patrolo* (fondita en 1969), eliteca literatura rondo kun itallingva kultura fono kaj jenaj intelektuloj: Manuela Bottiglioni, Tazio Carlevaro, Gianluigi Gimelli, Gaudenzio Pisoni (+1989), Clelia Conterno Guglielminetti (+1984), Carlo Minnaja, Nicolino Rossi kaj Giorgio Silfer (*1949). La unua prezidanto (ĝis 1985) de L. nomiĝis →*Tazio Carlevaro* (*1945), dum →*Perla Martinelli* (*1938) gvidis la ĉefredaktadon de la revuo →*Literatura Foiro (LF)*, kiu estis ekeldonita en 1970, do dek jarojn antaŭ la fondo de L.

Kadre de la 36a IJK en Raŭmo (Rauma, Finnlando, 1980), la oficialaj kaj spiritaj reprezentantoj de L., komprenante sin esence transnacia organizo, kun tiamaj roluloj de TEJO esence kontribuis al la lanĉo de la ‘Manifesto de Raŭmo’, kiu laŭ propra kompreno estis nova strategia modelo por la Eo-komunumo, konceptanta sian e-istecon kva-

zaŭ kiel apartenon al memelektita diaspora lingva minoritato. La manifeston subskribis centoj da junaj Eo-intelektuloj, krom L. ankaŭ Svisa Eo-Junularo (SEJ). La raŭma manifesto ekservis kiel centra argumentaro opozicie, aŭ alternative, al la finvenkismo, kiel ĝi estas reprezentata unuavice de UEA kaj ties Landaj Asocioj. La manifesto, en la sekvo defendata kaj propagandata precipe de L., kaŭzis gravajn ideologiajn konfliktojn inter ambaŭ strategiaj tendencoj, kun la rezulto, ke almenaŭ la ĉefaj funkciuloj de L. distanciĝis de la superaj organoj de UEA, bojkotante la UK per sia nepartopreno. Samtempe oni klopodis, kun diversa sukceso, raŭmisme influi pli kaj pli vaste la Eo-mediojn por konvinki ilin, ke raŭmismo estas prava.



Giorgio Silfer kaj Perla Martinelli, motoroj de LF-koop

Tiel L. evoluis al influa opiniovado pere de la organizado de diversaj sciencaj aranĝoj (*Internacia Literatura Forumo*, ekde 1981, kaj *Mediterranea Konferenco de Esperantologio*, ekde 1984). La 3a Internacia Literatura Forumo okazis paske en Ĝenevo 1983, la 4a ILF en Laŭzano en aprilo 1984, la postajn forumojn L. organizis en aliaj landoj.

L. strukturis sin ankaŭ kiel eldonejon sen profita celo. Ĝia aktiveco etendiĝis al la eldonado de libroj, revuoj, kasedoj kaj vidbendoj. Tiel aperis ne nur gravaj verkoj kiel

la krimromano *Varmas en Romo* (1986) de Corrado Tavanti, *Enlumas min senlimo* (1990), antologio de itala poezio, redaktita de Carlo Minnaja, kiu eĉ ricevis premion de la itala registaro, kaj *Dekamerono* (1990) de Gaston Waringhien. En 1985 reaperis ĉe L. la mondfama finna epopeo *Kalevala*, en pli ol kvin mil ekzempleroj.

Inter la kasedoj eldonitaj de L. ekde 1981 estas menciinda la kasedo, kiu prezentas la slovakon rokgrupon *Ora Team* (1987) kaj la serio de la belga lulkantistino *Nikolin'* (*Invito al ĝojo*, 1987; *Jula lando*, 1988; *Nur per amo*, 1989; *Laŭ lula ondo*, 1990). En 1983 estis lanĉita la unua eldono de la *Esperanta Songazeto*. Krom tio L. realigis la vidbendojn *Kiam Parizo estis Parizo ankaŭ por ni E-istoj* (1989), *Kinarto kaj ni. Antologio pri Eo en kino* (1990) kaj la unuan fikcian filmon en Eo, *Angoroj* (1992). L. motoris ankaŭ la verkadon kaj tradukadon de kanzonoj por *Gianfranco Molle* kaj *Anjo Amika* (t.e. *Anna Lászay*).

1981-87 L. eldonis la revuojn *Planlingvistiko*, *Lombarda E-isto* kaj *Transalpa E-isto*. En 1982 L. malfermis sidejon en Ĝenevo, kiu en 1984 denove estis fermita.

Kun la celo formadi gvidantarojn por la Eo-komunumo en 1985 en Bouresse (Francio) L. kunkonstruis la internacian stagejon *La Kvinpetalo*, oficiale inaŭguritan en 1987, kun kiu L. restis ligita ĝis 1997.

Kiel kulmino de la agado de L. povas esti konsiderata la starigo de la *Esperanta PEN-Centro* en 1991, laŭ iniciato de Nemere, Silfer kaj Martinelli. La celaro de la Esperanta PEN-Centro, kiun PEN Club International akceptis en 1993 en sian sinon, konsistas en la plenumo de la taskoj de PEN-Klubo Internacia, la poziciigo kaj defendo de la valoroj de la esperantlingva literaturo inter la etnolingvaj literaturoj kaj en la stimulado de la Eo-verkistoj.

Post la morto de Ada Fighiera-Sikorska en 1996 L. akiris *Heroldon de Eo*.

En 1997 posteulo de L.-prezidanto Silfer, kiu okupis tiun oficon de 1985, fariĝis *Marc Hiltbrand* el Ĝenevo; en 2003 li estis elektita por tria mandato, kun la asisto de Perla Martinelli kiel vicprezidanto.

En 1994, meze de grava ekzista krizo ĉirkaŭ KCE/GEP, la aktivuloj de L. transprenis la

gvidadon de KCE kun Silber kiel ĝia nova prezidanto. Post la unua forumo por la →Esperanta Civito en aŭgusto 1998 la aktivuloj de L. dediĉis pli kaj pli da tempo al tiu projekto.

→Literatura Foiro (revuo) →KCE →SES

→Esperanta Civito

LITERATURO (beletra)

Dekomence ne mankis klopodoj por traduki beletran L. nacilingvan de Svislando aŭ pri Svislando en Eon. Diversaj e-istoj tradukis ankaŭ verkojn el la monda L. Jen kelkaj signifaj ekzemploj de tiu tradukagado kaj -arto dum la jardekoj.

Jam en 1906 aperis *Wilhelm Tell*, la mondfama kvinakta klasika dramo pri la svisa nacia heroo Wilhelm Tell de la germana verkisto Christoph Friedrich von Schiller (1759-1805). Ĉi tiu spektaklo, kies kadra temo estas la libereco, estis unuafoje prezentita en 1804 en Weimar. *Wilhelm Tell* de Schiller apartenas al la plej signifaj verkoj de la germana L. kaj estas konsiderata de la svisoj iusence kiel nacia epopeo, kiu ankoraŭ nuntempe regule estas ludata en Svislando kaj aliloke. Laŭ la versmetro de la germana originalo *Wilhelm Tell* de Schiller estis esperantigita de Ludwig Emil Meier (+1919), germana e-isto kaj eksa volapükisto el Munkeno kaj Nurembergo, kiu apartenis al la pioniroj de la Eo-movado en Germanio. Kiel verkisto Meier tradukis plurajn verkojn el la germana L., ankaŭ el Heyse, Bölsche, Grillparzer, Lessing k.a. *Wilhelm Tell* en Eo estis dediĉita al SES de la tradukinto kiel „signo de sia amo de Svislando kaj sindono al la afero esperanta” kaj prezentita okaze de la 2a UK en Genevo. La 150-paĝa libro mem aperis kiel eldonaĵo de SES en Bazelo en 1906, presis ĝin H.A. Tanner. Fritz Wenk (Albananlage 7), Basel, distribuis ĝin. En 1908 aperis ĉe Librairie de l'Espéranto en Parizo la libro sub la titolo *En Svislando*. Ĉe tiu plaĉe ilustrita publikaĵo kun 104 paĝoj da amplekso temis pri kolekto de verkoj de svisaj aŭtoroj, kiuj estis tradukitaj de E. Ramo (laŭ la *EdEo* pseŭdonimo de *Maria Milsom*). Milsom (1851-1933) estis franc-devena pionirino en katolikaj rondoj, kiu kunlaboris ankaŭ kun la ĝenevaj e-istoj. Ramo/Milsom evidente estis ravita de la peniga, danĝera kaj

patriarkeca vivo de la svisaj montaranoj kaj de la malfeliĉaj italaj kamparanoj pelitaj trans la svisan limon pro politikaj okazintaĵoj kaj de urbanoj, kiuj vivas intensan intelektan etoson. Tiel ŝi elektis la jenajn pecojn de la sekvantaj aŭtoroj: *La lasta ekskurso* (La dernière course) de *Maurice Clévoz*; *Bona mal-liberulo* (Le bon prisonnier) kaj *Patrino* (La mère) de *Virgile Rossel*; *La Venĝonto* (Der Rächer) de *Maja Matthey* kaj *La trompisto* (L'imposteur) de *René Morax*. Krom tio Milsom tradukis kaj eldonigis (ĉe UEA en 1911 je sia propra kosto) la faman romanon *Fabiola* de kardinalo Nikolaus Wisemann, 427-paĝa ilustrita verko, kiu rakontis pri la katakomboj en la tempo de la persekutado de la kristanoj. Dua eldono sekvis ĉe *Espero Katolika*. Krome ŝi tradukis *Perfekta kuiristino*, unuaktan komedion laŭ B. Hentsch, *Eĉ en doloro ni estu ĝojaj* de *Adèle Kamm* (1910) k.a.



Libroj *Wilhelm Tell*, *En Svislando*

Svisaj rakontoj nomiĝis la kajero 7/8 en la serio Internacia Librotrezoro, eldonita de Germana Esperanto-Librejo en 1913 en Leipzig (Germanio). En tiu jaro okazis la 9a UK en Berno. El la germana lingvo la svisa e-istino *Charlotte Pulvers*, LKK-anino de la berna UK, tradukis kun speciala permeso de la aŭtoro tri prozaĵojn de *Ernst Zahn* (*1867 Zürich; +1952 Meggen/LU): *La malbonŝanca Seno* (Der Unglückssenn), *La Lunradio* (Der Mondstrahl), *Requiem* (Requiem). Zahn estis konata svisa verkisto, reprezentanto de la t.n. Heimatkunst-movado, kiu ŝatis priskribi la vivon kaj etoson de la provinco kaj de la

alpmontara popolo. Kiel politikisto Zahn iam prezidis la kantonan konsilion de Uri kaj portis la honordoktoran titolon de la ĝeneva universitato. Post siaj restadoj en Ĝenevo, Anglio kaj Italio, Zahn transprenis (en la jaro 1900) la stacidoman restoracion en Göschenen/UR, en kiu li ankaŭ mem laboris. Pulvers, kiu estis ravita pri Zahn, entuziasme notis en sia enkonduko: „Liaj verkoj estas originalaj kaj tipaj kaj elflugigas la parfumon de liaj solecaj paŝtejoj sur la altaj Alpaj montoj, la parfumon de la mallonga herbo kaj de la bovinejoj, oni kvazaŭ vidas la Alpajn flo-rojn, starantajn apud rokoj kaj fendoj. Ni aŭdas la pezan paŝon de la senoj kaj la trotadon de iliaj brutaroj. Kaj trans valojn kaj montojn flugadas la gaja jodlo de juna alpulo kaj la nekompareble melodiana sonorado de la bovinaj sonoriloj – la orkestra muziko en la montaro de Svislando.“ Krome Pulvers skribis, ke ŝi „klopedis plejeble korekte imiti la originalecon de la Ernst Zahn’a stilo, por ke la leganto laŭpove havu la veran, originalan verkon en nur fremda vestaĵo.“ En la libreto estis publikigita la fotoj de Zahn kaj Pulvers. Pulvers enkondukis la tradukon ‘seno’ (germanlingve: Senn) por svisalpa paŝtisto (sed laŭ PIV seno estas japana monero). Cetere PIV registris la tipe svisajn (aŭ alpmontarajn) vortojn kiel ĉaledo (aŭ ĉaleta), fonduo, jodli, rakledo.



Tradukistoj: Charlotte Pulvers, Alfred Bader, Arthur Baur, Madeleine Stakian

Antaŭ la unua mondmilito ankaŭ la bonkonataj Eo-aktivuloj →Hector Hodler, →Edmond Privat kaj →René de Saussure iom verkis, parte publiciste aŭ traduke, parte beletraj aŭ science. Precipe el la traduka plumo de Hodler devenas la *Legendo de S. Juliano* de *Gustave Flaubert* (Ĝenevo 1907), *Sabla homo* de *E.T.A. Hoffmann* (Ĝenevo 1907). René de Saussure tradukis *Aline, svisa rakonto*, de *Charles-Ferdinand Ramuz* (Genève 1911);

en 1915 sekvis la dua eldono de lia traduko de *Adèle Kamm* de la ĝeneva verkisto *Paul Seippel* (1858-1926).



Verkistoj: Henri Vatré, Corrado Tavanti, Claude Piron kaj Dante Bertolini


La literatura verkado de svisaj e-istoj sendube kulminis en la →*Svisa Antologio*, signifa antologia libro pri la traduka Eo-L., aperinta 540-paĝa en 1939 en la eldonejo Literatura Mondo en Budapeŝto (Hungario). Ĝia ĉefredaktoro →Arthur Baur tiam efektivigis kvazaŭ heroan laboron. En la Svisa Antologio estis reprezentitaj gravaj verkistoj de tiu tempo el la alemana, velŝa (francilingva, romanda), tiĉina (itallingva) kaj romanĉa L., kun po unu parto de prozo kaj poezio.

Kvankam tiu antologio restis la unua kaj lasta klopedo de la svisaj e-istoj eldoni signifan referencan verkon pri la tradukita svisa L., en postaj jaroj realiĝis ankoraŭ kelkaj aliaj interesaj projektoj. La bazela e-isto →Alfred Bader tradukis, fine ankaŭ kun la apogo de →Jakob Schmid kaj Paul Le Brun, la dupartan romanon *Ĉe la sanktaj akvoj* (An Heiligen Wassern) de la zurika aŭtoro *Jakob Christoph Heer* (1859-1925) kaj en 1947/48 ankaŭ mem financis la eldonon. Ĉi tiu verko el la t.n. patrujromana ĝenro subite famigis ĝian aŭtoron. Jam antaŭe Bader estigis la Eo-tradukojn de *Imenlago* de Theodor Storm, *Maruŝka* de Mela Escherich, kiuj kune estis publikigitaj sub la titolo *Du amosentaj noveloj* (1945).

Post ĉi tiuj nomitaj tradukistoj, la tradicio de verkado kaj tradukado estis daŭrigita precipe de →Giorgio Silfer, →Dante Bertolini, →Tazio Carlevaro. Iliaj beletraĵoj aŭ publikaĵoj aperis aŭ memstare aŭ en periodaĵoj kiel *Literatura Foiro*. Ankaŭ →Andreas Künzli aperigis kelkajn svisajn legendojn kaj rakonton de L.N. Tolstoj (*Lucerno*) en tiu revuo. Precipe →Claude Piron kaj →Corrado Tavanti fariĝis kun siaj originalaj krimromanoj tutmovade

legataj kaj konataj. →Madeleine Stakian tradukis multajn svisajn popolkantojn en Eon. →Henri Vatré kuntradukis *Floroj de l'Malbono* de Charles Baudelaire (1957), *Nokta flugo* (1983) kaj *Tero de la homoj* (1985) de Antoine de Saint-Exupéry. Kun siaj traduka verkaro (*Universalgesang*) kaj du-lingva poemaro *Zauberwort Weltrekord* kiel poeto iĝis konata ankaŭ →*Heinrich Lorenz* (Lorenz Urbano). Nelaste oni ne forgesu ankaŭ la literaturemajn fratojn →Cezaro Rossetti kaj →Reto Rossetti kaj ties verkaron.

Aparte menciindas la laboro de *Tomasz Chmielik* (*1957), e-isto kaj instruisto el Pollando kun speciala simpatio al Svislando, la svisaj kulturo kaj literaturo. Dank' al liaj bonegaj germanlingvaj lingvokonoj en la 1980-90aj jaroj tradukiĝis grandparto de la verkaro de *Friedrich Dürrenmatt* (1921-1990). Inter tiuj ĉi tradukoj, kiuj estas konsulteblaj ĉe CDELI (La Chaux-de-Fonds), troviĝas tiom elstaraj titoloj kiel *Estas skribite* (Es steht geschrieben), *La blindulo* (Der Blinde), *Romulo la Granda* (Romulus der Grosse), *Anĝelo venis al Babilono* (Ein Engel kommt nach Babylon), *La vizito de la maljuna damo* (Der Besuch der alten Dame), *La fizikistoj* (Die Physiker), *La proceso pri la ombro de azeno* (Der Prozess um des Esels Schatten), *Stranitzky kaj la nacia heroo* (Stranitzky und der Nationalheld), *Nokta interparolo kun malestimata homo* (Nächtliches Gespräch mit einem verachteten Menschen), *Herkulo kaj la stalo de Aŭgio* (Herkules und der Stall des Augias), *Entrepreno 'Vego'* (Das Unternehmen der Wega); de la prozo estis tradukita *La juĝisto kaj lia ekzekutisto* (Der Richter und sein Henker), *Greko serĉas grekinon* (Grieche sucht Griechin), *Paneo* (Die Panne). Krome Chmielik elgermanigis la verkon *Rakontoj por infanoj* (Kindergeschichten) de *Peter Bichsel* (*1935) kaj *La lada tambureto* (Die Blechtrommel, 2000) de Günter Grass. Sed li tradukis ankaŭ el la juda kaj pola lingvoj multajn rakontojn kaj romanojn de Isaac Bashevis Singer, Ŝolem Alejĥem, Ichok Lejbuŝ Perc, Ŝalom Aŝ, Bolesław Prus, Bruno Schulz, Hanna Krall, Ryszard, Kapuściński, Andrzej Szczypiorski k.a. (→CDELI)



Friedrich Dürrenmatt, Tomasz Chmielik

Cetere en la verkaro de Friedrich Dürrenmatt estas troveblaj almenaŭ du lokoj, kie estas menciitaj Volapük kaj Eo.

En *Stoffe II* (1981), ĉapitro *Mondfinsternis*, Dürrenmatt raportas, ke lia patro lernis en sia junaĝo Volapük, kiun poste forpuŝis Eo, kaj ke li estis eble la sola, kiu ankoraŭ komprenis Volapukon.

Eo estis menciita en la ĉapitro de la krimromano *Justico* (1985), kie advokato Spät estas vokita al la oficejo de la prizona direktoro kaj kie en la ĉeesto de gardisto la enkarcerigita krimulo, kantona konsilisto d-ro h.c. Isaak Kohler, rakontas, ke li, Kohler, lernas Eon kun la gardisto Brunner kaj ke ili interparolas sole en ĉi tiu lingvo.

→Bibliografio

LOMBARDA ESPERANTISTO

Eo-periodaĵo aperinta en Bellinzona/TI inter 1981 kaj 1986 kiel komuna periodaĵo de Tiĉina Esperanto-Ligo (TEL) kaj Kooperativo de →Literatura Foiro (LF-koop), kiel daŭriganto de *Tiĉina Informilo*. Redaktis ĝin →Perla Martinelli, →Giorgio Silber, Stani Mach, Paola Mamone, Carla Sfardini, Adriana Castello, Eda Bernasconi, Marco Picasso k.a. En 1987 L. estis daŭrigita de *Lingua Verde*.

→Bibliografio (gazetaro)

lombarda esperantisto
periodico regionale a carattere internazionale

LOZANA INFORMILO

Organo de Laŭzana ES (LES), aperanta en Laŭzano de 1959. Iam redaktis ĝin Paul Arbenz (1960-70aj jaroj), →David Buhlmann (1977-80), →Nicole Margot (1980/81), François Mottet (1981), Franco La Spina (1984-93), la geedzoj Jaqueline kaj Pierre-Henri Vasserot, poste Michel Roch.
→Vaŭdo →Bibliografio (gazetaro)

Heinrich (Heiner) LORENZ

1902-1980



L. estis aŭstro vivinta de 1956 en Lucerno. Post la deviga lernejo li laboris iun tempon ĉe la poŝto. Dum la dua mondmilito li kontraŭvole partoprenis la germanan militiron en Ruslando. En la posta vivo li plenumis plej diversajn laborojn por vivteni sin, ekzemple kiel kantisto kaj dancisto okaze de geedziĝfestoj. Krom tio oni konis lin kiel poeton. De sia junaĝo L. montris fortan lingvan intereson. En la Eo-movado li aktiviĝis kiel tradukisto kaj verkisto. El sep nacilingvoj li esperantigis proksimume 1000 mondfamajn kantojn, ariojn kaj poemojn, i.a. el Goethe kaj Schiller. Lia traduka verkaro (*Universalgesang*) ekspoziciigis eĉ en la viena Hofburg. En 1964 aperis lia dulingva poemaro (germana/Eo) *Zauberwort Weltrekord* sub la pseŭdonimo Lorenz Urbano. Krome li skribis la manuskripton por kosmopolita *Unua Mondlibro* kun la celo verki ĝian Eo-tekston tiel, ke ĝi estu komprenebla por homoj kun diversaj gepatrolingvoj. Alia libro nomiĝis *Grandioza plano*. L. kompilis ankaŭ tekstojn por *Svisa Himno* en ĉiuj kvar naciaj lingvoj de Svislando kaj por *Eŭropa Himno* en Eo; la

ĉi-lastan projekton li submetis al la respondeca eŭropa instanco en Strasburgo. Kiel e-isto, membro de la lucerna ES kaj de SES kaj precipe kiel kantisto kaj poeto L. agis iom mesianiste por atingi la nebulan „grandiozan celon“ de la homaro. Liaj altaj idealismaj streboj perpleksigis la samtempulojn kaj provokis la skeptikon flanke de la Eo-publiko.
→Lucerno

LA LUCERNA PROGRESO

Eo-periodaĵo aperinta en Lucerno inter 1979 kaj 1985 kiel oficiala organo de EG Lucerno (EGL) kaj Esperanto-Junularo Lucerno (EJL), ekde 1980 de Lucerna ES (LES). Entute aperis 18 numeroj. La fondinto kaj redaktoro de L. estis →*Andreas (Andy E. Künzli* (*1962).
→Lucerno →Bibliografio (gazetaro)



LUCERNO

Kantono en centra, germanlingva Svislando (germanlingve: Luzern, mallong. LU: 1493 km², 356'100 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Luzern (en Eo: Lucerno laŭ PIV).

La unua informo pri e-istoj en L. datas el la jaro 1903, nome el la dua eldono de la *Dua nomaro de l'anoj de l'Svisa Esperanto-Societo*, kiu estis publikigita en SE, aprilo 1903. Ĝi listigis la nomojn de Paul Probst kaj F. Ackermann, kies adreso estis ĉe la

ferentrepreno von Moos. Komence de 1905 Eduard Zeder instruis Eon al 13 personoj, samtempe realiĝis diversaj prelegoj, aperis gazetartikoloj en la loka gazetaro. Tiel estiĝis la kerno de la unua lucerna EG, pri kiu interesiĝis ankaŭ s-ro J. Zimmermann, direktoro de la lucerna pacmuzeo. En 1906 iu libristo malfermis Eo-oficejon en Kappelgasse. La EG kunvenis en la lernejo Săli.

En 1905 la tria ĝenerala kunveno de SES okazis en L. kaj traktis i.a. la inviton de la 2a UK al Svislando.

Tiutempe en L. estis propagandita ankaŭ la Delegacio por la adopto de la lingvo internacia, iniciatita en 1900. Sekve ankaŭ en L. aperis malgranda *Ido-movado*, kun kiu simpatiis ĉefe katolikoj kaj maldekstruloj (→*Ido*). Malgraŭ la konkurenco de la idistoj, kelkaj novuloj kiel d-ro Bucher-Heller, redaktoro de la loka gazeto *Eidgenosse* kaj J. Forster, instruisto en la centrasvisa trafiklernejo, rezistis la Ido-krizon, preferante la vojon de Zamenhof. Fine de 1908 Forster fariĝis kaskisto de la ĵus fondita Svisa Eo-Biblioteko kaj en 1909 gvidis la grupon de lucernaj e-istoj, kies aliaj estraranoj nomiĝis Marie Troxler, instruistino, kaj A. Brüttschlin. La grupo kunvenadis en la lernejo Musegg, okupiĝis ĉefe pri tradukado de tekstoj kaj faris konversaciajn ekzercojn. Nova kurso kun 15 partoprenantoj povis esti gvidita de d-ro Albert Heim, kaj ĉe la konata presejo C.J. Bucher aperis en 1909 ilustrita prospekta libreto en Eo pri la lucerna glaĉera ĝardeno (vd. sube).



Laŭ la informoj, kiujn oni disponas, la unua mondmilito havis ĝenerale malfavorajn sekvojn por la movado. En L. vivis kelkaj izolitaj e-istoj kiel ekzemple la grizon-devena

instruisto *Stephan Simeon* (1863-1942), kiu e-istiĝis en 1910 kaj kiu rilatis kun internigitaj eksterlandaj soldatoj. Kelkaj el ili sekvis Eo-kurson, kaj la 23an de marto 1917 ili povis akcepti en hotelo Beau-Rivage siajn kursatestilojn kaj premiojn, kiuj estis donacitaj de la ĝeneva Nova EK. Malgraŭ tiuj pozitivaj agadoj, *Svisa Espero* (SE) bedaŭris la senteban malfortiĝon de la lucerna Eo-movado, despli ĉar la e-istoj konsideris L. kiel gravan urbon por la fremdaj turistoj, kiujn necesus servi ankaŭ pere de Eo.

Por doni novan impulson al la lucerna movado, SES invitis en 1919 sian membraron denove al L., kie la ĝenerala kunveno okazis en hotelo Flora. La ĉefe traktita temo, la propagando, evidente ne alportis rezultojn, ĉar dum la venontaj jaroj la lucerna Eo-movado malaperis, kune kun ĝiaj adeptoj de la unua generacio, inter kiuj pluraj mortis.

Ĝuste en tiu periodo, nome en 1922, en L. Eon lernis la svis-devena usonano →*Joseph R. Scherer* (1901-67) antaŭ ol elmigri al Usono du jarojn poste, kie li fondis la EK de Los Anĝeleso kaj fariĝis usona civitano.

La silenta epoko de la lucerna Eo-movadeto daŭris ĝis la jaro 1927, kiam nekonata propagandisto gvidis kurson, kiun sekvis kaj finis sep personoj. La dua generacio de e-istoj kunvenis la 6an de aprilo por fondi la lucernan EG. Inter la aktivuloj de tiu klubo troviĝis *Emil Hilfiker* (1928-?), kiu estis la unua prezidanto de la lucerna EG kaj kiu kunfondis ankaŭ la svisan sektion de IKUE en Zug, kaj *Richard Huber* (1876-1948), poŝt oficisto kaj grupa prezidanto en 1919. Aliaj membroj nomiĝis Anton Eggermann, dua prezidanto en 1928, Waldis, Schnieper, Bühlmann. Pri tiuj personoj ne ekzistas informoj en Eopublikajoj. En 1929 en la lucerna EG membris 17 personoj. La librovendisto Josef Haas (1874-1946) vendis Eo-librojn kaj -gazetojn.

Dum la ekonomie krizaj 1930aj jaroj la lucerna EG vegetis, ĝis kiam →Eduard Spielmann, la direktoro de la →Svisa Eo-Instituto en Berno, gvidis novan kurson en 1937 kaj esence kontribuis al la renaskiĝo de la lucerna EG.

Heinrich Lauber (1906-76) prezidis la grupon plurajn jarojn ekde 1933. Dum la dua mondmilito la lucernaj e-istoj pli malpli

regule kunvenadis en hotelo Raben. La septembra/oktobra numero 1946 de *SE* komunikis, ke „dank’ al la viglaj klopodoj de nia sindonema samideano *Josef Koch* estis decidite refondi la grupon. La nova grupo nun nombris 20 membrojn, el kiuj 14 estas junuloj kaj novuloj. Ili ĉiuj estis gajnitaj pere de la t.n. korespond-varbmetodo de s-ro Koch, kiu rolis kiel grupa prezidanto. La sekreto de la sukceso de la varbmetodo de Koch konsistis evidente en tio, ke li distrumpetis al la homoj, ke pere de la lingvo Eo oni povas korespondi kun homoj el Ameriko kaj aliaj foraj landoj. Tio evidente estis ioma sensacio por la tiama publiko.

Al la ĵus revekiginta grupo aliĝis *Johann Mohr* (1870-1966), inĝeniero kaj teknika oficisto ĉe la svisaj fervojoj (ĝis 1936) en L., kie li vivis de antaŭ la jarcentoŝanĝo. Mohr lernis Eon kiel maljunulo en 1946, aliĝis al SES kaj UEA, kaj fakte dank’ al li, kiu oficis kiel (honora) prezidanto de la lucerna EG (1947-61) kaj kiel UEA-delegito en L., la movado en tiu urbo ne pereis.

En 1955 Eon lernis *Paul Scherrer* (*1933), kiu fariĝis la prezidanto de la lucerna EG kaj UEA-delegito kaj oficis en tiu funkcio dek jarojn inter 1962 kaj 1972.

Al ĉi tiu tria generacio de e-istoj apartenis ankaŭ la sekvantaj samideanoj kaj samideaninoj:

Emil Gehring (1895-1987), diplomita inĝeniero ĉe la svisaj fervojoj, e-isto de ĉ. 1960. Li estis kasisto de la lucerna EG dum multaj jaroj, fakdelegito de UEA pri fervojoj kaj vicprezidanto de SAEF (1966-69). Lia granda espero, ke unu el la pontoj en la lucerna ŝiphaveno ricevu oficiale la titolon de Eo, kiam la urbaj aŭtoritatoj en 1980 publike serĉis nomon por tiu ĉi ponto, tamen ne plenumiĝis. En 1984 Gehring ricevis la nomumon de honora membro.

Reinhard (Rinaldo) Albus (1928-82), diplomita forstingenerio kaj inĝeniero ĉe la svisaj fervojoj, prezidis la lokan EG en 1961/62, estis UEA-fakdelegito (forsto) kaj redaktis ankaŭ la revuon *Svisa Fervojisto* de SAEF (1960-65).



Sonja Brun kaj Josef Koch dum la berna UK en 1947

Spite al sia blindeco *Luciano Ortelli* (*1938) oficis kiel kluba sekretario inter 1961 kaj 1976.

Tre originalecan membron la lucernaj e-istoj posedis en la persono de →*Heinrich Lorenz* (1902-80), denaska aŭstro, kiu vivis de 1956 en L. Li agadis iom mesianiste kaj iĝis konata pro sia dulingva poemaro (germana/Eo) *Zauberwort Weltrekord* sub la pseŭdonimo Lorenz Urbano.

Alia fidela anino de la lucerna EG nomiĝis *Lisel Lötscher* (1898-1965), kiu plenumis la taskojn de la sekretariino en la 1950aj kaj de la kasistino en la 60aj jaroj.

En 1960 la svisaj Eo-tagoj okazis en L., hotelo Rütli. Kaj en 1961 la EG sukcesis aranĝi ekspozicion en la lucerna Trafikmuzeo, kies oficiala prospekto enhavis ankaŭ resumon en Eo.

En 1972 en la urbeto Sempach ekloĝis la flandra e-isto →*Hector Boffejon* (1901-83), kiu sekve membriĝis en la lucerna EG.

Dum multaj jaroj al la estraro de la lucerna EG/ES apartenis ankaŭ la fervojisto *Johann Lutz* (1923-92) kiel ĝia prezidanto (1972-79) kaj poste vicprezidanto. Ĉi tiu tre simpatia romanĉ-devena trajnestro lernis Eon en 1967 en fervojistaj medioj, kie li aktivis kiel estrarano de SAEF. Dum multaj jaroj en la hejmo de tiu SES-membro kaj UEA-delegito en Kriens estis kompostata kaj presata *Svisa*

Fervojisto, *SER*, *La Lucerna Progreso* kaj diversaj aliaj informiloj. Krome li apartenis al la LKK de la 64a UK (L. 1979). En sia aktiveco por Eo Lutz estis helpata de sia (same romanĉa) edzino Julietta Lutz-Parolo (*1922).



Johannes Mohr, urugvaja e-isto kaj Sonja Brun antaŭ la leona monumento en Lucerno



En 1979 aperis kolora turisma prospekto plene en Esperanto

Al la plej kulmina Eo-evento iam ajn okazinta en L. - nome la 64a UK en la lucerna kongresejo de la jaro 1979 - pilgrimis 1635 e-istoj el 48 landoj (→Universalaj Kongresoj). La lucerna gazetaro ĉiutage raportis pri la kongreso, la turisma oficejo eldonis koloran prospekton plene en Eo, kaj la centra biblioteko de L. kaj la Trafikmuzeo aranĝis ekspoziciojn pri Eo. Kiel filatelaj frandaĵoj aperis svisa poŝtmarko je la valoro de 70 centimoj kaj unuataga koverto (→Filatelo).



Paul Scherer, Johann Lutz



Kongresa glumarko de la 64a UK en Lucerno

La lucerna UK, kiu de UEA estis laŭdita kiel unu el la plej brile organizitaj kongresoj, generis tute novan, tre aktivan kvaran generacion de e-istoj, kiuj esence refreŝigis la vivon de la loka EG, kiel kutime okazas post tiaj grandeventoj. Al LES aliĝis antaŭ, dum aŭ post la kongreso, la sekvantaj novaj membroj kaj membrinoj: *Annelies Dettling-Ammon* (*1925), kiu post la morto de Emil Gehring servis dudek jarojn kiel societa ka-

sistino; *Renata Filali* (*1945) el Kriens kiel sekretariino kaj kasistino; *Konrad (Koni) Rey* (*1943), kiu lernis unue la profesion de lignaĵisto, poste laboris kiel fervojisto kaj fariĝis dumviva membro de la lucerna ES, de SES kaj UEA; li prizorgis dum multaj jaroj la komunan Eo-montrokeston de la lucerna ES kaj de SAEF en la malnova lucerna stacidomo. *Franz Brügger* (1919-2006) instruadis Eon ĉe la COOP-lernejo en L. kaj okupiĝis pri la societa biblioteko antaŭ ties transdono al CDELI. Ĉar Brügger estis firme konvinkita pri la alveno de la t.n. 'tago x', kiam Eo estos enkondukita en publikajn instituciojn de Svislando, li alvokis la e-istaron bone prepari sin. Ankaŭ lia edzino Margrit Brügger partoprenis la kluban vivon. Eble iom dubinda estis la ideo de la LES-anoj sendi leterojn al politikaj instancoj sur kantona, svisa kaj internacia niveloj, por iom rigore postuli la enkondukon de Eo krom aŭ anstataŭ iuj nacilingvoj.

Aliaj fidelaj membroj de LES nomiĝas Rosa Mettler (*1930) el Kriens/LU kaj Louise Bachmann el Emmen/LU.



Franz Brügger, Annelies Dettling

En 1979 ekaktivis en la Eo-movado → *Andreas (Andy) Künzli* (*1962), kiu tiam estis 17jara gimnaziano, lanĉante la kluban informbultenon *La Lucerna Progreso*, de kiu ĝis 1985 aperis 18 numeroj. Künzli poste okupis plej diversajn funkciojn en SES, TEJO kaj UEA, preparis parton de la Eo-elsendoj de SRI (1986-92), laboris kiel sekretario kaj organizanto ĉe KCE (1993-94) kaj fariĝis la aŭtoro de ĉi tiu enciklopedio.

Fine de 1980 la klubaj membroj ŝanĝis la statuton de sia organizo el la jaro 1948 kaj donis al ĝi la nomon *Lucerna Esperanto-Societo (LES)*; *Paul Scherer* (*1933) estis elektita kiel prezidanto. Ĉi tiun honoroficon la emerita maŝindeseĝnisto, kiu en la 70aj jaroj ankaŭ estis la svisa reprezentanto de IKUE, okupis jam ekde 1962 kaj merite plenumas ĝis nun. Ankaŭ lia edzino Margrit Scherer-Graber parolas Eon kaj de longe estas fidela klubamembro.

En 1981 la membronombro de la lucerna ES atingis 30 personojn, kio estis proklamita kiel rekordo.

Post multjara restado en eksterlando revenis en 1987 al Rotkreuz/ZG → *Sonja Brun* (*1930), kiu transprenis gravajn funkciojn en la lucerna EG kaj en aliaj svisaj Eo-organizaĵoj, ekzemple tiun de la UEA-ĉefdelegito (1993-2002).



Konrad Rey, Sonja Brun, Andy Künzli

Neeviteble la LES-anoj ankaŭ perdis kelkajn membrojn. En 1998, ekzakte je la zamenhofa tago, forpasis en L. Hans-Peter Isaak (1937-98). Ĉi tiu iom konata gitaristo ekinteresiĝis pri Eo jam kiel 14jara knabo kaj partoprenis kurson gvidatan de Johannes Mohr. En 1979, la kongresa jaro, li re-aliiĝis al la lucerna EG. Intertempe LES perdis sian fervoran membron kaj estraron *Angelo Mellini* (1934-2002), kiu loĝis en Hermetschwil/AG kaj iam laboris kiel bankisto, poste kiel meblofakulo ĉe la firmao Löttscher en Littau. Kiel e-isto de 1982 li prizorgis i.a. la repaĝon de la societo kaj redaktis la gazeteton *Dialogo*. Krome forpasis la membroj Carla Müller (1924-2002) kaj Karlota Ecklin (1926-2003).



Du eldonoj de *Svisa Esperanto-Revuo*, titole dediĉitaj al Lucerno, el 1975 kaj 1979

Dum la jardekoj la societo plurfoje ŝanĝis sian kunvenejon (restoracioj Alpenhof, Johanniter, Spatz, Simplon, lernejo Wartegg ktp.) kaj ekde kelkaj jaroj kunvenas en Emmenbrücke. Specialaj konversaciaj renkontiĝoj okazis ekzemple en la iama lucerna kafejo Big Ben.

Tamen la manko de novaj fortoj endanĝerigas la pluekziston de LES. La 75-jara jubileo de la lucerna EG estis solene festita en 2002 en hotelo Steghof, kie estis festparole prezentita ĉi tiu historia skizo pri la lucerna Eomovado.

Minimume 10-foje L. gastigis la ĝeneralan jarkunvenon de SES.



La Lucerna Progreso aperis inter 1979 kaj 1985



Paul Scherer, brila akordionisto tre ŝatata dum Eokunvenoj (fotis A. Künzli en Bazelo en 2005)